# Asturaj Kongresoj de Esperanto

Ni jam raportis pri la **Unua Astura Kongreso de Esperanto**, kiu okazis en Navia en la jaro 1986. La du ceteraj esperantistaj urboj de Asturio, Avilés kaj Gijón, organizis siajn proprajn kongresoj en iuj el la sekvintaj jaroj. Poste ni priskribos ilin. Sed nun ni devas mencii ke en la epoko kiun ni priraportas nun (jaroj 1988-1990), Navia jam ne plu troviĝis en la klubo de la esperantistaj urboj de nia regiono. Ni indikis ke la aŭtoro de la miraklo de la subita ŝpruco de Esperanto en tiu urbo estis samideano José Carlos Chapoli Motta. Tiu sinjoro estis Direktoro de la tiuurba sukursalo de iu banko. Kiam tiu financa entrepreno destinis lin al alia urbo for de nia regiono, la E-movado en Navia ne persistis. Ne estas malofta okazaĵo en nia E-movado tio ke la persisto de la esperantista aktivado en iu loko dum kelke da tempo dependas de la laboro de unu sola persono, kaj se tiu persono mankas, la afero disfalas.

Feliĉe, ĝis nun en nia urbo, Gijón, dum la daŭro de tuta jarcento ne mankis la aktivado de unu aŭ pluraj diligentaj gesamideanoj. Iu el ili, kiu reprezentis tiun esperantistan kontinuecon en Gijón dum la malfacila epoko de la civilmilito kaj la posta silenta jardeko, estis samideano Alberto Menéndez. Li ligis la etapon de la unua **Astura Esperanta Asocio**, gvidita de Francisco Menéndez Rúa, kun la etapo de la renaskiĝinta **AEA**, subgvide de Santiago Mulas. Tiun longan tempo-periodon li kovris kun sia esperantista aktivado kun la helpo kaj akompano de Alfredo Villa, José Ordieres… Ni faras ĉi tiun memoraĵon ĝuste en ĉi tiu parto de nia historia raportado tial ke Alberto Menéndez mortis precize je la komenciĝo de la periodo priraportata, en januaro de la jaro 1988.

Cetere, post la jam priskribita festado de la Centjara Jubileo de Esperanto, la aktivado de **AEA** daŭre disvolviĝis kiel kutime. En marto de la jaro 1988 nia E-grupo ricevis la viziton de usona samideano James Fonseca; pri tio oni informas en la numero 61a de **HELECO**.

Temante pri tiu revuo ni diru ke ĝis la mezo de tiu jaro 1988 ĝia aperado estis regula, aperis unu numero ĉiu dumonato. Sed la numero 63a estis la sola dum la sesmonato julio-decembo de tiu jaro. Kiel ia kompenso por la legantaro ĝi havis 18 paĝojn anstataŭ la 12 de la ceteraj numeroj de tiuj jaroj. La numero 64a de la revuo normale revenis al la 12-paĝa normaleco kaj dumonateco (januaro-februaro 1969). Ĝi informis pri la modesta celebrado de la esperantista festo de 1988: florofero en la strato Esperanto kaj bankedo. Ĝi informis ankaŭ pri tio ke Julio Argüelles prelegis pri Esperanto en tri publikaj lokoj de nia urbo, kaj ke Santiago Mulas komencis gvidi novan E-kurson en Avilés.

Alia informo kiun liveras al ni tiu 64a numero de **HELECO** estis ke samideano Nicolás Muñiz, Prezidanto de la E-grupo **ANTAŬEN** de Avilés gajnis en televida konkurso altvaloran premion konsistantan en libroj en kaj pri Esperanto, kiun li transdonacis al la Kultura Servo de la magistrato de Avilés.




Nova kap-desegno de HELECO ekde marto 1989

Pri tiu 64a numero de la revuo ni devas aldoni ke ĝi estis la lasta ellaborita de samideano Ildefonso Domínguez Losada. Li senlace plenumis tiun taskon dum dekdu jaroj kaj laŭlonge de tiu tempo li preparis 63 numerojn de la gazeto. De tiam, kaj ĝis la nuntempo, okupiĝas pri tiu tasko Faustino Castaño. La ŝanĝo de redaktoro signifis ankaŭ ŝanĝon en la kapo-desegno de la titol-paĝo de la revuo. Sed estis pli gravaj ŝanĝoj. De tiam la revuo estas ellaborata tute per komputilo; antaŭe ĝi estis kvazaŭ manlaboraĵo, t.e. farita per skribmaŝino.

La 65a numero de **HELECO**, unua ellaborita de la nova redaktoro, informis pri la **Dua Astura Kongreso de Esperanto**, kiu okazis en Avilés dum la tagoj 22a kaj 23a de aprilo 1989. Tiu esperantista renkontiĝo estis sufiĉe brila ene de la modesteco de la teritoria amplekso de la koncerna esperantistaro (ne landa sed regiona, kaj krome de malgranda regiono kia Asturio). Partoprenis en ĝi, krom la gesamideanoj de Avilés kaj Gijón, ankaŭ iuj el aliaj regionoj.

Inter la debatoj de tiu kongreso estis planoj kaj projektoj pri starigo de multregiona E-organizaĵo nomata “Asocio de amikoj de Orienta Atlantiko”.